

## KISOJ

Bobby Darin  
esperantigo: Emanuele Rovere (Manŭel)

Se vi iĝus mia korknabino,  
ĉiun horon vi ricevus kison,  
sed vi restas nur kun l' amininoj  
kaj sola neniam venas promeni kun mi.  
Se rigardas mi vizaĝon vian,  
mi ĉirkaŭbraki volas vin ĉebruste.  
Certe, ankaŭ vi deziras tion,  
sed sola neniam venas promeni kun mi.  
Ĉiam mi volas viajn kisojn por mi,  
ilin mi redonos al vi,  
kara, feliĉa estu kun mi, je jes!  
Ne plu diru " ne, ne, ne! "  
Kisojn kun amo donu, kisojn al mi ne ŝparu,  
la tutan vivon kaj unu tagon plu.

Nun vi estas mia korknabino,  
tamen multajn kisojn vi ne donas,  
kvankam ilin mi ege bezonas,  
kaj tiel soifa restas daŭre mi.  
Mi atendas kison tutan tagon,  
sekva kiso venas post semajno.  
Se plu daŭros tia situacio,  
pro soifeg' je kisoj mortos mi.  
Ĉiam mi volas viajn kisojn por mi,  
ilin mi redonos al vi,  
kara, feliĉa estu kun mi, ne plu diru " ne, ne ne! "  
Kisojn kun amo donu, kisojn al mi ne ŝparu,  
la tutan vivon kaj unu tagon plu.